

Bô Yin Râ

# SPIRITO KAJ FORMO

Basle 1936

Copyright by Kober'sche Verlagsbuchhandlung



## La demando

*Vi* volas atingi la *spiriton* kaj post longa erarado *trovis* la vojon al la spirito.

Kaj nun vi demandas:

„Kion povas utili al mi ĉia *formo*, nun kiam mi konas la vojon al la *enhavo*?“

Sensignifa kaj senvalora ŝajnas al vi la *formo*; vi opinias ne nur, ke tio plej interna malkaŝu sin al vi *senforme*, – vi jam vidas *malhelpaĵon* en ĉiu *formo*.

*Malestiminde* ŝajnas al vi ankoraŭ atenti la *formon*; – malestimindaj ŝajnas al vi ĉiuj strebantaj al *perfektiĝo de formo*.

Vi *mem* pensas, ke vi nun povas facile *malhavi* ĉian *formon*.

Tamen vi volas, ke oni aprezu *vin*, eĉ *senforman*, kiel homon strebantan al *plej altaj valoroj*.

Ŝajnas al vi grandaj *malsaĝuloj* ĉiuj, kiuj *ofendiĝas* pro tio, ke vi *malestimas* la *formon*.

Vi sentas vin *alte elstaranta* super tiu malsaĝo de aliuloj, kaj ridetante vi demandas: „Kion povus utili al mi ĉiu *tia ekstera ligiteco sur la vojo al la spirito*? – Kion utilis al mi la *formo*!?! – –“

\*

Vidu, mia amiko: – mi ne dubas, ke vi trovis la vojon al la spirito.

Sed mi dubas, ke doniĝos al vi bona *gvidado*, kiun vi ja urĝe bezonas, se vi volas persisti en tio, ke vi *mokas* la *formon*.

Vi pensas, ke oni devas ekkoni vian *sincerecon*, devas atenti la *ardon* de via strebado, kaj ke via *pura volado* devas atesti por vi ...

Havante tiun ĉi opinion, vi certe tute ne eraras, sed tamen vi devos lerni ekkoni, ke vi *ne devas malatenti la formon*, kaj ke via tuta agado ricevas sian finan *valoron* nur per la *formo* adekvata al ĝi.

Kiel oni ne surtabligos delikatan vinon en malaltkvalitaj argilaj vazoj, ĉar tio signifus malestimi la valoron de l' vino, tiel same la nura *respekto* antaŭ la spirito postulas, ke sufiĉu al vi nur *plej perfekta* formo, tuj kiam vi volas mem fariĝi „*templo de la spirito*“.

Viaj tutaj memprezentado kaj memeksterigo en la ekstera mondo devos konstante atesti tian respekton.

Tuj kiam vi *ekiris* sur la *vojon al la spirito*, vi *ne plu* estas libera konduti laŭ viaj neagemeco kaj ĉi-momenta kaprico.

Vi estas *devoligita* transformi vin mem kaj fariĝi *esprimo* al la *spirito*.

Al vi *mem* vi donu la *plej altan formon*, kaj kio ajn povas fariĝi *perceptebla* al aliuloj per via agado, tio montru vian *perfektiĝintan formon*.

Ne per *malestimado* de la formo vi pruvos *superecon*.

Nur *malsaĝulo* povas opinii sin „*supera*“ al ĉia *formo*.

Homo vere supera ĉiam *regos* la formon.

Tiu *regado* montriĝas eĉ en *plej ĉiutaga* agado ...

La *cinikulo*, kiu sin kovras per ĉifonaj vestoj por montri sian *senbezonecon*, vere estas mizera *afektulo*, tiom longe,

dum la forto de liaj brakoj ebligas al li akiri per iu *laboro* sufiĉan monon por aĉeti al si *respektindan veston!*

Sed kiu volas ŝanĝi sin mem en *templon de la spirito*, tiu prenos sur sin ĉiun penon, por ke li pruvu eĉ en sia *eksteraĵo* la *respekton antaŭ si mem ...*

*Se lia posedaĵo tion permesas*, oni vidos lin ĉiutempe en la *plej bona kaj eleganta* vestaĵo de lia lando, kaj se li estas malriĉa, li tamen uzos ĉiun eblon, por ke lia *mizereta* vesto ĉie trovu *respekton ...*

Certe, kuras tra la mondo tiu aŭ alia homo, kiu malkaŝas ĉion, kion li povas revii en sia tera ekzisto, nur en la kudroj de siaj laŭmodaj *vestoj*; – sed la digna vestaĵo de interna nobleco estos ĉiam *distingebla* de nuraj drapiraĵoj, kiuj envolvas vantan nenion. –

Kiel la maniero *vesti* sin pravas la *respekton* de homo antaŭ *si mem* kaj antaŭ *la spirito*, al kiu li volas fariĝi *templo*, tiel same oni povos ekkoni en lia tuta *agado*, ĉu li scias *honor* tion, kio vivas en li. – –

Ke „*la bona vivmaniero*“ fariĝis grava ankaŭ por multaj homoj, kiuj lernis *kaŝi* per ĝi tion, kio ili vere *estas*, pravas nur, ke *origine* oni renkontis ĝin nur ĉe homoj, kiuj vere *estis* tio, kio ili ŝajnis esti. –

Kreita de *homoj de interna valoro*, ĝi ne estas senvalorigata tie, kie ĝi restas *masko*, same kiel *oro* ne povas perdi sian valoron, kiam amoristino portas ĝin kiel ornamaĵon ...

Multaj estas la memcertaj *malestimantoj* de tiu „bona vivmaniero“, kiuj ne rimarkas, ke en ĝi fariĝis *formo* tio, kion ili mem alstrebas per granda gesto kiel *etikan postulon*. – – –

Ili ne vidas, ke eĉ tie, kie tia vivmaniero fariĝis „*malplena*“ formo, ĉar mankas al ĝi la *spirita enhavo*, ĝi efikas ion multe *pli bonan*, ol iam povas efiki ilia propra

*obstineco*, kiu rigardas ĉiun belan formon kiel „*mensogan vivkonducon*“.

Vere, tre ofte „*la filoj de ĉi tiu mondo*“ estas ne nur „*pli prudentaj*“, sed ankaŭ *pli bonaj*, ol tiuj, kiuj opinias sin sole privilegiitaj fariĝi „*filoj de la lumo*“!

Jen mi konsilas al vi: *ne malatentu la formon*, – ĉu en *grandaj*, ĉu en *malgrandaj aferoj*!

Vi certe ne alstrebu la alproprigon de „*malplenaj*“ formoj, sed vi *lernu formi vian tutan vivon*, kaj nenio estu al vi tro malgrava por direkti vian tutan strebadon al tio, ke vi montras ĝin en ĝia plej bela kaj plej perfekta *formo*.

## Ekstero kaj interno

Vi, kiu estas sur la vojo al la *spirito*, sciu, ke nenio *neformita* povas iam *malkaŝi* sin al vi!

Ankaŭ la *spirito* bezonas formon, se ĝi *fariĝu spertebla* al vi.

Kiel nenio en tiu ĉi *ekstera mondo* malhavas *formon*, tiel same ankaŭ en la *interna* mondo nenio estas perceptata, krom se ĝi fariĝis *formo*.

Vi parolas pri „*malplena*“ formo.

Sed konsideru, ke eĉ la *malplena* formo ankoraŭ estas *manifestiĝo de volo*, kiu iam kreis al si *esprimon* en ĝi, same kiel la konko de heliko parolas al vi pri la animalo, kiu vivis en ĝi. – –

Kio fariĝis *formo* en tiu ĉi *ekstera mondo*, estas esprimo de *io interna* de la ekstera mondo, kio aliamaniere neniam povus malkaŝi sin al vi.

Tiel same ĉiu formo de la *interna* mondo ĉiam estas esprimo de *io plej interna*, kio kvazaŭ neniam ekzistus por vi, se vi ne ekkonus ĝin en vi kiel *formon*.

Provu ekkapti en la *ekstera* mondo *tion internan* en ĉiu *formo*, kies *esprimo* ĝi estas!

Tiel vi plej bone preparos vin al tio, ke vi ankaŭ en la *mondo de la spirito* iam vidos en ĉiu *formo*, kiu tie renkontas vin, *tion plej internan*, al kio ĝi estas *esprimo* kaj kio lumas el ĝi.

Ankaŭ ĉiu *vivoformo*, kiun la homo kreis en tiu ĉi ekstera mondo, por ke li povu pli facile porti, komune kun siaj

samspeculoj, la ŝarĝon de tiu ĉi tera vivo, povas servi al vi kiel alta instruo ...

Ankaŭ tie ĉi, al „*ekstero*“ ĉiam respondas „*interno*“, eĉ se tiu „*interno*“ jam de longe ne plu estas *sentata*. –

*Serĉu* tiun ĉi „*internon*“, kaj kiam vi *trovis* ĝin, tiam iu aŭ alia bela *vivoformo*, kiun vi rigardis nur kiel esprimon de mensogo, leviĝos por vi al *alia* valoro. – –

Krome, kelkaj homaj *kutimoj*, kiuj hodiaŭ ŝajnas al vi malsaĝaj, tiam montriĝos al vi kiel *formo* kun saĝa *enhavo*.

Ne estos necese unue fari studojn pri ĉi tio, kiuj kondukas vin en *forajn tempojn* aŭ eĉ al *malproksimaj popoloj*.

Kie ajn vi troviĝas, vi povas komenci en la *ĉiutaga vivo* kaj en *via plej proksima ĉirkaŭaĵo*.

Tie ĉi estas *via plej sekura grundo*, kaj nur malsaĝeco malestimas ĝin, por *enrevigi* sin en antikvaj tempoj kaj ĉe malproksimaj popoloj kaj tie senti sin pli hejme. – –

Mi trovis serĉantojn, kiuj strebis al la spirito kaj opiniis – apenaŭ konsciante sian malsaĝecon –, ke ili estas malhelpataj per la *vestoj* de iliaj tempo kaj lando ...

Ili ne komprenis, ke povas trovi la *spiriton* homo, kiu en festa kompanio submetiĝas al ties *formoj*, kaj ke li sentas sin bone nur tiam, se lia vesto estas adaptita al la reguloj de tiuj formoj en ĉiu detalo ...

Teruro kaptis ilin, kiam iu, kiu dum migrado en alta, kruta montaro sciis paroli pri la spirito, zorgis pri tio, ke, vespere alveninte en ripozejo, lia vesto konformis al la ĝenerala kutimo observenda en festa, gaja rondo dum la vespera manĝo. – –

Tiel oni vidis ilin plaĉi *al si mem* en sovaĝe aŭdacaj vestoj, kaj ili plaĉis al si ne malmulte, konscie montrante al

aliuloj, ke ili jam antaŭ longe – laŭ sia aroganta opinio – fariĝis *superaj* al la *formo*. –

Aliaj portis bibliajn vestojn kaj promenis en tiu maskerado dum la luma tago, – ĉiu estante „kristo“, aŭ almenaŭ unu el la apostoloj, – kaj neniu ŝajnis suspekti, kiel tiuj, kies *maskoj* ili estis elektintaj, *priridus* ilin, se ili vivus *hodiaŭ meze de la okcidenta mondo*. –

Kaj tamen ili foje estis tre *honestaj serĉantoj*, kiuj vere strebis al la *spirito*, malgraŭ sia malsaĝa farado. –

Tiel eraras homo, kiu opinias sin „fariĝinta supera“ al la *formo*.

Siaopinie „libera“ de ĉiu formo, li kreas al si formojn strangajn, kiuj *ne konformas* al la formoj de l' *ĝenerala tuto*, estiĝintaj en ĉiu lando en la fluo de la tempo, kaj pensas, ke li mem estas multe „pli bona“ ol tiuj, kiuj *ne sekvas* lian vantantan ekzemplon. – –

Kion mi tie ĉi priskribis, tio eble estas la *plej kurioza* speco de la malsaĝa provo malligi sin el la *formo* de siaj *tempo kaj lando* ...

Multe *pli grandnombraj* estas la strangaĵoj, kiuj floras en *kaŝiteco*. –

Sed *komuna* al ĉiuj estas la erara supozo, ke la serĉanto, kiu volas proksimiĝi al la *spirito*, povas plenrajte senti sin „supera“ al ĉiu *formo*, sed precipe al ĉiu formo manifestiĝanta en la ĝenerala *kutimaro* de homa kunvivado.

Sed kelkfoje tiu *malestimado de formo* fariĝas *krimo kontraŭ la homa socio*.

Ekzemple: se tiu malestimado direktiĝas kontraŭ la *edzeco* kiel malhelpanta ligo el antaŭaj tempoj, pro ĝiaj eblecoj de erarado; – ekzemple, se tiu malestimado provas elradikigi ĉion, kion la homaro mem plantis kiel ŝirmilon, por

ne subfali al la ŝtormo de misdirektitaj instinktoj kaj senbridaj pasioj. — — —

Saĝe oni iam ekkonis la *danĝeron*, kiu estas imanenta en ĉiu *malestimado de formoj*. —

Rapide faligebla estas nun tio, kio bezonis *jarcentojn* kaj *jarmilojn* por kunkreskiĝi tiel, ke ĝi vere povis doni *protekton*. — —

Sed *longe* daŭros la tempo de konstantaj *ŝtormoj*, eĉ se oni fine provas *denove* planti la arbaron, kiu antaŭe protektis kontraŭ ili.

Tiel ĉiu *malestimado* de la *formo* havos malbonajn sekvojn. Oni vidas nur la *eksteron* kaj forgesas, ke ĝi estas malkaŝiĝo de *io interna*. — —

## Loĝejo kaj ĝia enhavo

La *loĝejo* de homo estas kvazaŭ lia *plej ekstera vesto* en tiu ĉi ekstera mondo, kaj kiel lia korpa *vesto* povas malkaŝi lin, tiel same ankaŭ la *loĝejo*, kiun li kreis al si.

Se vi havas la potencon konstrui al vi vian propran domon, eĉ se aliulo sperta pri la arto de konstruado planas por vi ĝian formon, via domo jam de *ekstere* montros, kiu vi estas ...

Sed ankaŭ se vi loĝas en ĉambroj, sur kies planado vi havis neniun influon, tamen la *maniero*, en kiu vi donis al la fremdaj ĉambroj vian *propran stampon*, havas multon por diri pri vi al spertulo ...

Vi ne trompos lin, eĉ se vi petis la plej bonajn artistojn de via lando krei al vi belegan meblaron kaj montri sian arton en la dekoraciado de viaj ĉambroj ...

Estos tuj evidente, ĉu prezentas sin tie ĉi nur la *artistoj*, kiujn vi komisiis krei belajn ĉambrojn, aŭ ĉu ili povis preni vian naturon kiel gvidilon, kaj kreis, kiel kompetentuloj, *esprimon* al ĝi.

Eble via loĝejo estas *antaŭformita* de *pli fruaj* loĝantoj, kiuj iam vivis en la samaj ĉambroj aŭ kun la sama meblaro.

Eble ĉiu objekto en via loĝejo rakontas al vi pri la homoj, kiuj estis *antaŭ* vi kaj kies sangon vi sentas en vi. –

Eble la formoj de ĉiuj tempoj estas nun intime unuigitaj en viaj ĉambroj, kaj tiu aŭ alia heredita objekto iam estis alportita hejmen el malproksimaj zonoj. –

*Eĉ tiuokaze* via loĝejo ĉiam estos atesto pri *via* naturo, ĉar kiom ajn da malnovaj aferoj ĝi entenas kaj kiom ajn la patino sur ilia surfaco ankoraŭ sentigas la etoson de antikvaj tempoj: ĉiam la maniero, en kiu vi faras tion malnovan la ekstera „vesto“ de *via vivo*, donas al la objektoj *novan* valoron, kiu deriviĝas *sole de vi*. --

Sed vi ne pensu, ke devas ĉirkaŭi vin belaj kaj altvaloraj objektoj.

Eĉ se vi vivas en *malriĉeco* kaj posedas nur tion plej necesan, via loĝejo tamen atestos pri la *harmonio* trovebla en vi, kiel ĝi spegulos ankaŭ la internan *konfuziĝon* kaj la sovaĝan *maltrankvilecon*, se vi ankoraŭ ne atingis la harmonion ...

Kion ajn vi posedas, via *interna* posedaĵo ĉiam *malkaŝos* sin en tiu ekstera.

Via hejmo, kiom ajn malvasta kaj malriĉa ĝi estas, ĉiam portas la *stampon de via animo*, ĉiam montras la formon, en kiu vi mem povas *formi* al vi la eksteran mondon. --

Estus granda *eraro*, se vi opinius, ke por homo strebanta al la *spirito* estas vanta farado zorge atenti, ke ĉio, kio ĉirkaŭas lin en tiu ĉi ekstera mondo, ankaŭ ricevu lian *amon!*

Ankaŭ tie ĉi la nura *respektego* antaŭ la spirito postulas, ke via hejmo estu pura kaj bela spite de via malriĉeco, kaj, kiam prospero doniĝis al vi, ke vi ne toleru ion ĉirkaŭ vi, kio ne estas inda je homo, kiu volas mem fariĝi *templo* al la spirito. ---

Vi devos tre zorge atenti, ke vi estu *konscia* pri la objektoj, kiuj ĉirkaŭas vin en viaj ĉambroj.

Tie ĉi nenio estas iam sensignifa, kaj eĉ tio plej malgrava ne devas foriĝi el via atento. --

Formoj, kiuj ĉirkaŭas vin, retroefikas sur *vin mem*, eĉ se vi apenaŭ konscie perceptas ilin. – –

Neniam vi povas direkti sufiĉan *zorgemon* al via *hejmo*.

La laboro de via *profesio* eble *malebligas* al vi, dediĉi la saman *zorgemon* ankaŭ al la *laborejo*.

Tie vi eble havas neniun eblecon formi la ĉambron laŭ *via naturo*, kaj kelka peza laboro estas ligita al loko, kiu apenaŭ povas esti nomata „ĉambro“. –

Eble via laboro ne estas farata en loko ĉirkaŭita de muroj.

Sed en via *hejmo* vi estas *libera* kaj povas formi ĝin laŭ *via naturo*.

Tie ĉi via okulo ne devas ekvidi ion, kio povus ĝeni la *harmonion de la animo*. –

La *hejmo* estu al vi *rifuĝejo* kaj agordu vin per ĉio, kion ĝi enhavas, al la *ĝojo*: – al varma, pura anima *sereneco*!

Eĉ se antaŭe *mallumo* vin ĉirkaŭis kaj malbonaj aferoj ankoraŭ pezas sur vin, enirante vian *hejmon* vi *deskuu de vi ĉion*, kio volas *premi vin malsupren*! –

Tie ĉi vi revenu *al vi mem* kaj al via *plej alta alto*! – – –

Se vi uzis la *zorgemon*, kiu estas necesa, por ke via *hejmo* estu ĉiurilate *inda* je vi, tiam la plej povra enhavaĵo parolos al via animo tiel, ke ĝi tuj retrovos sin, eĉ kiam ĝi fore perdiĝis en la sovaĝa bruo de la ekstera ĉiutaga vivo. – –

Kio ajn tiam ĉirkaŭas vin en via *hejmo*, memorigos vin pri via *plej bona sentado*, parolos al vi kiel *via mondo*, kaj donos al vi *trankvilon* kaj serenon *pacon*. –

\*

Ĉiu el la partoj, kiuj konsistigas vian *hejmon*, estas homa *verko*.

*Atentu* pri tio, ke ĉiu parto ankaŭ portu la stampon de *homa digno*! –

Vi, kiu volas percepti en vi mem la voĉon de la *eterna spirito*: – kiel vi povus toleri ĉirkaŭ vi en via hejmo aferojn, kiuj volas *ŝajni* io, kio ili ne estas, – kiuj kvazaŭ *mokas* pri la leĝo de formo! – –

La estanteco bedaŭrinde estas plenigita je aferoj, kiujn oni prefere subakvigus en la maro tie, kie ĝi estas plej profunda.–

Ĉiu *originala* formo, kiu estas esprimo de interna sentado, estas *sensente imitata* de agemaj manoj, sed la *vivo* de la formo *perdiĝas* dum tiu farado, kaj kio restas, estas *kadavro*.

Oni forgesis aŭ neniam suspektis, ke ĉiu formo estas *vivanta* signo de *lingvo* kaj havas ion por *diri*. – –

Tiel oni amasigas „kadavropartojn“ sur „kadavropartojn“ sen fariĝi konscia pri tio. –

La popoloj de l' *oriento* havas *diferencan* scion, kiom ili ankoraŭ ne perdis ĝin sub la influo de okcidentuloj. –

Oni permesu al mi mencii okazaĵon kiel ekzemplon.

Granda eŭropa komerca entrepreno sendis al oriento varon, por kiu oni povis ĉiam atendi abundan vendon.

Por plibeligi la *pakumon*, oni iun tagon farigis al si novajn konceptojn de kolorriĉa ornamentaro en la *formoj de orienta arto*, opiniante, ke per tio oni certe havigos al si eĉ pli grandajn rondojn de aĉetantoj.

Sed la mastro de l' entrepreno devis sperti, ke la tuta liveraĵo estis *resendata*.

La orientaj komercistoj, kiuj antaŭe ĉiam deziris la varon, estis *rifuzintaj* akcepti ĝin en la nova pakumo.

Kaj jen la *motivo* por ilia rifuzo:

Ili diris, ke ili estus en danĝero de morto, se ili eĉ nur tolerus tiun novan pakumon en siaj vendejoj, ĉar ĉiuj formoj montritaj sur ĝi estis por pia hinduo *krudaj blasfemoj* ...

Se la homo de l' okcidento estus ankoraŭ same kapabla *senti* formojn, tiam li devus el sia sentado rifuzi *multon* en sia medio kun *sama* abomeno. --

Sed li ne plu povas interpreti la *lingvon* de la formo, kaj tolereble bona gusto pri aranĝo kaj pri la uzo de koloroj sufiĉas al lia postulo.

Tamen oni ne pensu, ke mi tie ĉi parolas nur pri aferoj, kiujn oni rigardas kiel *ornamon* ...

La plej simpla *tablo* aŭ *seĝo* povas porti en si la *vivon* de la formo, same kiel la plej pompa meblo de la sama speco povas esti nur *morta skafaldo*, „ornamita“ per „kadavro-partoj“ ...

La samo aplikiĝas al ĉiu *vazo* kaj *ilo*, kiuj estas necesaj por la plej simpla vivo. --

Tial zorgu, ke ĉirkaŭu vin nur aferoj, pri kiuj vi povas -- antaŭ la *spirito*, kiun vi volas trovi en vi, -- *respondeci*, se vi iam *trovas* ĝin.

Vi *vere* portas *respondecon* pri tio, ke estu en via domo *neniu* meblo, ilo aŭ ornamentaĵo, kiu ne estas akordigebla kun la digno de homo, kiu volas fariĝi „*templo de la spirito*“.

Tiacele ne estas necese, ke vi estu informita pri arto kaj artaj aferoj.

Multo povas esti valora al la artisto, kaj multon el antaŭaj tempoj vi trovas en muzeoj, kiu tamen *ne* portas la stampon de *homa digno*, kvankam ĝi sciigas pri la alta *kapablo* de homo. --

Tio, kio servu *al vi* kiel mezurilo, estas de *alia* speco.

Vi, kiu volas unuigi sin al la *spirito*, kiu estas en si mem *harmonio* kaj *klareco*, *lumo* kaj *vero*, devos toleri ĉirkaŭ vi *nenion*, kio malkaŝas en siaj formoj *malharmonion*, estigas *neklarecon* kaj lulas vin en dormon de obtuza *malhelo*!

Tio, kio ĉirkaŭas vin, devas montri formojn, kiujn vi mem sentas *veraj* kaj *puraj*.

Forigu el via sfero ĉion, kio en sia formo malkaŝas *malveron*, aŭ kio *fariĝas* malvera per tio, ke ĝi ne estas akordigebla kun via propra sentado. –

Neniam forgesu, ke ĉio, kio ĉirkaŭas vin, *retroefikas* sur vin kaj *formas vin mem!* – –

Vi certe ne akceptas senelekte ĉiun homon en vian hejmon ...

Tiel vi lasu ekster via loĝejo ankaŭ ĉiun *objekton*, pri kiu vi ne volas, ke ĝi havu *influon* sur la *formo de via animo!* – –

## La formo de la ĝojo

*Ankaŭ* via ĝojo devas trovi noblan *formon*, se ĝi estu inda je vi. –

Eble vi ŝatas „*ne bridu vin*“ en via ĝojo, kaj ne volonte atentis pri *formo* ankaŭ en ĝojo. –

Ŝajnas al vi, ke tio plej bona de via ĝojo estas perdita, se vi ne povas lasi vin al ĝi *senbare* ...

Vi ankoraŭ ne povas imagi al vi vere feliĉigan surteran ĝojon, kiam oni diras al vi, ke vi donu plej noblan *formon* ankaŭ al via ĝojo. –

Sed tie ĉi vi troviĝas en *eraro*, kiun tre *multaj* homoj dividas kun vi. – –

Ne pensu, ke ĝi ĉiam estis fremda al *mi*!

Vidu, mia amiko: ankaŭ mi iam paŝis sur la alloga strato de eraroj, kiu sur tiu ĉi planedo dekondukas homojn ...

Kiel alie mi povintus esti preparata por helpi al tiuj, kiujn atingas mia vorto? –

Se mi nun konsilas al vi *formi* ankaŭ vian plej petole liberan ĝojon, mi scias, kion tio signifas, kaj samtempe scias, ke mi nur *pliigas* vian ĝojon, se vi volas sekvi min. – –

Neniam la homo trompas sin tiom multe, ol kiam li opinias, ke la ĝusta ĝojo devas esti *senbrida* kiel sovaĝe fluanta rivereto. –

Sovaĝa rivereto donas al mi bone taŭgan *bildon*, kaj se mi povas resti ĉe tiu bildo, tiam oni rememoru, ke ankaŭ sovaĝa

rivereto fariĝas *sendanĝera* nur tiam, se oni scias *digi* ĝin, se oni scias *formi* ĝian vojon. –

Sed ve al la kampoj, – ve al la juna semitaĵo, se ĝi en sia plena printempa forto superbordiĝas kaj forlasas sian ŝtonan liton de natura fluo! –

Tiel ankaŭ via ĝojo fariĝas *danĝero* al vi, tiom longe, kiel vi ne *formis* ĝin, kaj kreu al mi: ankaŭ *mi* antaŭe spertis tiun danĝeron tre ofte, tiel ke mi vere rajtas *averti* kontraŭ ĝi.

Kiel piloto devas tre bone *koni* la rifojn, antaŭ ol li povas gvidi la ŝipon sendanĝere tra surfo en la havenon, tiel same mi tre bone konatiĝis, per vivlonga sperto, kun tio kio devas esti *evitata*, se la *spirita* celo de homo fine fariĝu *atingebla* por li, *malgraŭ* la altaj ondoj de pasio kaj la ŝtormo de instinktoj ...

Kiom volonte vi volus „*forges*“ vin en via ĝojo, – forgesi „*vin*“, kiun vi mem starigis en via imago, kaj al kiu vi donis la *nomon*, kvazaŭ li *vere* estus *vi mem*, – estu gardema kaj atentu la *danĝeron*, kiun vi povas *kontraŭstari* nur tiam, se vi scias *formi* ankaŭ vian *ĝojon*! –

Vi ja bedaŭros, ke vi ne povas plene *lasi* vin al via ĝojo, sed bone memoru, ke ĉio, al kio vi plene *lasas* vin, faras el vi sian *sklavon*! –

Sed tie ĉi vi fariĝu *mastro* de via ĝojo, kaj ĝi estu plene *subordigita* al via forto de formado!

Mi ne parolas tie ĉi pri la kvietaj daŭrantaj ĝojoj, kiujn via bone formita vivo kreskigas al vi, same kiel en bone flegita ĝardeno floroj kreskas preskaŭ dum la tuta jaro. –

Sed vi certe rimarkis, ke mi parolas pri via *ĝojo*, kiam ĝi postulas sian apartan *rajton* en aparta *okazo*. – –

Tiaj okazoj povas esti tre diversaj, kaj ili povas renkonti vin en tre diversa maniero.

Se vi jam konsciiĝis, ke vi *formu vian tutan vivon*, tiam estos al vi facile formi ankaŭ vian *ĝojon*, se vi ne plu vivas en la eraro, ke vi rajtas fine *forges*i vin en via *ĝojo*.

Certe ne temas pli la plej malbonaj homoj, kiuj kelkfoje opinias, ke ilia *ĝojo* estas donita al ili nur por ke ili povu „forges*i*“ sin.

Sed kiu estas tiu, kiu tiel estas forgesita?!

Vere tiu *ne* estas *vi mem*, eĉ se vi elektis en gaja maskerado la maskon al vi plej fremdan.

Ĉiam *vi mem* estos tiu, kiu sentas sin kiel la „*mi*“ de tiu masko. — —

Kion vi volas *forges*i, tio estus inda, ke vi forgesu *ĝin* ankaŭ en via *ĉiutaga vivo!* — —

*Vi mem* kreis *ĝin*, farante *ĝin* via *tirano*, kaj tio de *vi* kreita fariĝas al vi tiom *peniga*, ke vi tre deziras *forges*i *ĝin*, kaj via *ĝojo* ŝajnas *instigi* vin al tio. — — —

\*

En tiu ĉi tera mondo vi trovis vian *teran veston*.

Kiam vi ankoraŭ estis *infano*, oni diris al vi diversajn aferojn pri tio, kio *vi mem* estas ...

Vi pensis, ke *vi mem* estas ekzakte determinita *per laŭdo kaj mallaŭdo*, — per la *taksado*, fare de plenkreskuloj, de viaj infanaj eksterigoj ...

Pliiĝinte, vi „sciis“, ke vi estas la infano de tre ekzakte determinita *familio*, kaj via tuta farado estis influata de tiu „scio“. — —

Sed tiam vi „liberigis“ vin de ĉia familia ligiteco, „sciis“ ke vi estas ano de via *popolo*, kaj ĉia *valoro*, kiun vi mem

atribuis al vi, originis el via *lerteco*, aŭ el via *nesufiĉa* sukceso, en iu ajn homa „*profesio*“ ...

Ĉu vi estis „*vokita*“ por praktiki ĝin, vi mem finfine apenaŭ sciis. –

Vi „enkreskis“ en ĝin, kaj vi nun opinias, ke estas via „*tasko*“ „*plenumi*“ ĝin tiel, ke ĉiuj, kiuj estas „*supermetitaj*“ al vi, aŭ havas „*juĝopovon*“, ne „*juĝas*“ vin kaj ne „*submetas*“ vin al iu alia. – –

Kio do vi estis en la okuloj de *aliaj* homoj, – kiel kio vi *aperis* al aliuloj, – tio estis kaj eble ankoraŭ hodiaŭ estas al vi ekzakta difino de tio, kio vi estas. –

La „*estimo*“ fare de *aliuloj* determinas al vi vian propran valoron. –

La „*admira*“ fare de *aliuloj* igas vin aperi al vi mem miriga. –

La „*rekon*“ fare de *aliuloj* sola instruis vin ekkoni laŭsupoze vin mem. –

La „*malestimo*“ fare de *aliuloj* ŝajnis al vi tiom rajtigita, ke vi mem povis *estimi* vin mem nur tute sekrete, kaj vi timas en vi mem, ke vi estas nur sklavo de via *vanteco*, kiam tamen „*leviĝis*“ en vi io, kio sovaĝe „*ribelis*“ kontraŭ la malestimo de aliuloj, ĉar ĝi volis *leviĝi* el la malalteco, kiun vi donis al vi mem. –

Tiel vi ricevis *ĉion*, kiel kion vi sentas vin mem, de *aliuloj*, kaj vi tute ne scias el *vi mem*, kiu vi estas.

Vere ne estas mirige, se vi deziras „*forges*“, kion nur la okuloj de *aliaj* homoj rigardas kiel vin mem.

Vere ne estas mirige, se vi volas *forges*, kion *aliuloj* – *faris* el vi! –

Sed *vin mem* vi *certe ne* volas *forges*.

Vi nur donas al *imago*, kiun *aliuloj enmetis* en vin, la rajton *esti rigardata* kiel vi mem. — — —

Tial mi jen konsilas al vi: ne forgesu *vin mem* en via ĝojo!

Tiu, kiun vi deziras forgesi, ĉar li *afliktas* vin, estante via propra kreitaĵo laŭ la mezuro de *aliuloj*, — tiun *vi certe rajtas* forgesi, kaj vi agas *bone*, se vi *tuj* forgesos lin! — — —

Sed *vin mem* vi sentu tre alte *levita* en via ĝojo!

Kio ajn alportas al vi *ĝojon*, tio estu por vi okazon por elprovi *vian forton de formado!*

Vi povos *centoblige* vian ĝojon, se vi scias *formi* ĝin laŭ la *ĝustmezureco* de *via* esenca naturo.

*Vi mem* devas esti la *mezuro* por la *formado* de via ĝojo, — ne tiu *fantomo*, kiun *aliuloj rigardas* kiel vin mem. — — —

Vi *respektu* la formon de ĝojo de *aliuloj*, kiom ajn ĝi ankoraŭ iel *meritas respekton*, sed ĝi ne devas fariĝi modelo por *via* formo de ĝojo, escepte se ĝi plene konformas al *via esenca naturo!* — —

Mia amiko, *formu* vian ĝojon laŭ *via propra* formo, ĉiam memorante mian parolon, ke nur *tiam* vi ne pentos vian ĝojon, se vi scias ligi ĝin en formo! — —

*Vi mem* devas doni mezuron al *via* ĝojo, se ĝi ne *trompu* vin! — —

*Vi mem* estas la plej sekura *garantio* de la *sekvo* de *via* ĝojo, se vi volas *formi* vian tutan ĝojon laŭ *via formo*, difinita *al vi* antaŭ *eterneco*. — — —

## La formo de la sufero

Sur via malsanula lito vi kuŝas en granda korpa mizero, kaj ŝajnas al vi tro malfacile, ankoraŭ strebi en tiu mizero al la *formado* ankaŭ de via *sufero* ...

Anstataŭe, vi timoplene explore ĉirkaŭrigardas por trovi eksteran helpon, kaj ĉiu pocio, al kiu vi donas vian fidon, ŝajnas al vi multe pli grava ol tiu farado ...

En bonaj tagoj vi eble opiniis, ke vi jam de longe estas „supera al ĉio tera“. –

Nun vi devas ekvidi, kiom forte vi ankoraŭ estas ligita al la *tero*. – –

Sed vi ne volas kompreni, ke via *spirita* forto povus *maligi* vin el tiu ligiteco, eĉ se ĝi eble liberigas vin ne *plene*. –

Certe, via povra korpo estas tiom turmentita, ke ĝi plu apenaŭ povas regi sin ...

Vi ankoraŭ konas nur tiun ĉi *unu* petegon: – ke via sufero *finiĝu* ...

Kiel moko ŝajnas al vi, paroli pri *formado* ankaŭ de la *sufero*. –

Vidu: mi vere povas senti vian suferon, ĉar nur malofte mi estis plene sen sufero. – –

Tial mi vere povas paroli pri *sufero* kaj pri la *superado* de la sufero per la *formo*, en kiu oni scias elteni ĝin ...

Mi mem scias tre bone, kiom forte la korpa sufero povas *pezi* sur homo kaj kiel ĝi *tamen* estas *bridebla* per *formado*. –

Transpasas preskaŭ ĉian imagon tio, kio povas esti efektivigata per *spirita formado*, kaj kiel *tio korpa*, kiom ajn

turmenta ĝi estas, ĉiam povas ankoraŭ esti *regata per spirita memdirektiĝo*. – – –

Kion vi rigardas kiel ion apenaŭ elteneblan, dum vi vekrias kun vi mem kaj plendas kontraŭ via sorto, tion vi tuj *superos*, se vi *volonte pretas* elporti ĝin, kvazaŭ ĝi estus *tute nature ligita* kun la vivoformo al vi plej adekvata, – kvazaŭ ĝi tute ne *povus* esti *alia*. – –

Bone estos al vi, se vi lernas *senvalorigi* korpan suferon tiel, ke vi *ne plu* devas *atenti* ĝin!

Tiom longe, dum vi *transdonas vin* al via sufero kiel sklavo al sia kruela mastro, de kiu li tremante atendas vipobaton, vi ankoraŭ ne donis al via sufero la *formon*, kiu estas inda je vi. –

Nur kun „malatento“ vi renkontu vian suferon, kaj nur kiel ĝia *malestimanto* vi fariĝas ĝia *mastro*! –

\*

En la sama maniero vi devas strebi al regado ankaŭ ĉe ĉiu *alia* sufero, kiu eble renkontas vin.

Ankaŭ *anima* sufero volas *humiligi* vin kaj regi super vi.

Ankaŭ pri tio mi povas diri sufiĉon, kaj ankaŭ tie ĉi mi certe ne parolas kiel persono, al kiu tiuj aferoj estas fremdaj. –

Sed mi trovis multajn, kiuj *amis* sian animan suferon tiom, ke ili volis apenaŭ lasi ĝin foriri, kiam ĝi memvole forlasis ilin ...

Certe tio ĉi *ne* estas la ĝusta maniero kontraŭagi suferon, kiu volas *premi* la animon *malsupren*.

Ankaŭ vian *animan* suferon vi lernu *regi* kaj devigi ĝin alpreni *formon*, kiu estas inda je vi!

Tiom longe, dum vi ankoraŭ „cerbumas“ en vi mem, eble por „eltrovi“ la finan *sencon* de via sufero, vi nur fosas foston al via *forto de rezisto* ...

La „senco“ de via sufero ne povas esti elfosata, ĉar vere: – via sufero ne havas „sencon“, antaŭ ol *vi mem* donas tiun al ĝi, kaj nur en *tiu ĉi* senco ĝi povas fariĝi „*sencoplena*“ por vi. – –

Via sufero eble estas *amara*, sed *vi mem* ne lasu vian suferon *amarigi* vian koron! –

Via sufero eble aperas al vi supermezure „*granda*“, sed *vi mem* ne prunteprenu vian grandecon de via *sufero*! –

Vi ne starigu al via sufero altaron en vi mem, kaj vi ne parade portadu ĝin antaŭ vi per levitaj manoj kiel sanktaĵon!

Kiel vi devas lerni *malestimi* korpan suferon, tiel vi devos lerni *prilabori* la suferon de via animo: – prilaborante doni al ĝi *formon*, kiu devas *servi* al vi formi *vin mem*. – – –

Ankaŭ al via *sufero* vi ne devas *lasi vin mem*.

Vi devas *levi* vin mem *super* vian suferon kaj lerni *ordoni* al ĝi.

Vi mem estas *tio daŭronta*, – sed via sufero estas *pasema*, kaj ĝi estas *mensogo*, kiam ĝi volas igi vin kredi al ĝia *daŭronteco*. – –

Lernu meti *barojn* al la sufero, kiuj devas *formi* ĝin laŭ via *volo*! –

Via sufero rezultigos *malfeliĉon* nur tiam, se vi ne scias *bridi* ĝin. – –

Sed nur kiel *venkinto* de via sufero vi povas atingi la *spiriton*.

La valoron de *vi mem* vi devas taksi vere *pli alte* ol tiun de via sufero, ĉar *en vi mem* volas *malkaŝi* sin al vi la *fajrere radiantanta lumo* de la *spirito*. – – –

## La arto de la vivo

Se vi *volas* trapasi la vojon, kiun mi jam priskribis al vi en aliaj libroj, kiel unu, kiu ĝin konas, – la vojon, kiu kondukas al la *lumo* en vi mem, tiam vi devos *formeti* ne malmultajn erarojn. – –

Sed antaŭ ĉio la eraron, ke via surtera vivo estas „*destino*“ kaj devas esti travivata tiel, kiel la aferoj prezentiĝas kaj okazas. – –

Kiu tiel travivas sian surteran vivo, tiu egalas arkitekton, kiu sen iu plano ordonus la elfosadon de grundo, por tiam konstrui hazarde, lauŝance, kiel ajn la afero disvolviĝas, ĝis la lasta ŝtono malhelpus lin konstrui plue.

Estas eble, ke lia sovaĝa konstruado sukcesas, rezultigante strangan formaĵon.

Sed pli probable estas, ke iam devus *frakasiĝi* sur lian kapon tio, kion li amasigis en malsaĝa, senplana farado. – –

Vi ne egalul tian malsaĝulon!

Tio, kion vi nomas via surtera vivo, estas *kruda materialo*, kiu ja estas *donita* al vi tia, kia vi trovis ĝin surtere, kaj je kiu vi povas ŝanĝi preskaŭ *nenion* aŭ nur *malmulton*.

Sed estas donite *sole* en *vian* manon, kion vi *konstruos* el ĝi en *spirita* formo, kaj neniu tera potenco povos malhelpi vin *konstrui tiel*, kiel la „*plano*“, kiun via *animo* vidas, postulas de vi. –

Eble vi volas respondi al mi, ke multo *ne* estas donita en vian manon: – ke en multaj aferoj *aliuloj* povus malhelpi vin, – ke la ekstera mondo eĉ povus disbati vian tutan konstruaĵon.

Kara amiko, tiom longe, dum vi ankoraŭ parolas *tiel*, vi ankoraŭ *ne* ekkonis, pri kio mi parolas al vi ...

Via *ekstera* konstruado vere *ne* estas decidita *sole de vi*, kaj viajn plej belajn murojn oni povas *faligi*, antaŭ ol vi povis volbi la kupolon super vian fieran konstruaĵon. – –

Sed vian *spiritan* konstruadon nur *vi mem* povas ĝeni aŭ lasi aliulojn ĝeni, al kiuj vi *permesas* tion. – – –

Tie ĉi temas pri la *verko de arto*, en kiun via *spirita* vivo formiĝu!

Via surtera ekzisto ĉiutage prezentas al vi novan *materialon*, el kiu vi povas arte konstrui vian *spiritan* vivon.

Neniam mankos al vi „ŝtonoj“ kaj „konstruligno“. Sed estos *via* tasko, *prilabori* la krudan materialon tiumaniere, ke ĝi adaptiĝas al la sublima plano, kiun via animo trovas *en si mem*, en sia plej interna ŝrajno. –

Estos *via* tasko, prepari la ĝustan „morteron“, kiu kunigas la ŝtonojn.

Estos *via* tasko, aranĝi la „trabojn“ tiel, ke ili povas *porti*.

Vi ne devos *malestimi* ion el tio, kion via surtera vivo ĉiutage alkondukas al vi.

Ĉio estas iel *necesa* por via spirita konstruado kaj estos utila, kondiĉe ke vi donis al ĝi la *formon taŭgan por konstruado*. – – –

Sed *nenio* estas uzebla en via spirita konstruaĵo, kio ne antaŭe estis *prilaborata* kaj spiritamaniere *antaŭformata*. –

Kion ajn la ĉiutaga vivo alportas al vi: – ĉiam demandu vin mem, kiel ĝi tuj estu *formata* por servi al via *spirita templokonstruado*!

Sed tiam *senprokraste* eklaboru, kaj ne ripozu, ĝis tio kruda ricevis sian adekvatan *formon*! –

Ju pli vi praktikas tiun saĝan faradon, des pli facila ĝi fariĝos al vi.

Kio hodiaŭ aperas al vi apenaŭ ebla, en tio vi jam tre baldaŭ sukcesos sen granda peno.

Sed vi devas montri *persistecon* en tiu farado.

Vi ne devas komenci hodiaŭ kun entuziasmo kaj post malmultaj tagoj lasi la plejmulton nefarita. –

Kion vi ne prilaboris, tio *kuŝos sur via vojo*, kaj tiel vi *mem* tre *malhelpos* vin, eĉ se vi pli malfrue volas komenci denove. – –

Ankoraŭ hodiaŭ, kiam vi aŭdas miajn parolojn, elserĉu en la interna ŝrajno de via animo la konstruplanon!

Tie ĝi estas bone gardita, kaj vi ĝin trovos, se vi serĉas en la plena *trankvilo* de sekura certeco.

Hasta traserĉado ne aperigos ĝin.

Sed kiam vi trovis ĝin, tuj eklaboru kaj restu fidela al via laboro!

Vi lernos kompreni la planon nur *dum la konstruado mem*, kaj kiam fariĝas necese, vi trovos ankaŭ la *detalajn planojn*, kiuj hodiaŭ ankoraŭ ne utilis al vi.

Iom post iom via formanta forto *pligrandiĝos*, kaj vi fariĝos *artista* je via *verko*.

Nenia „trejnado“ povas anstataŭi tion, kion nur la *verko* povas instrui al vi.

Vi ankoraŭ ne disvolviĝis, kaj ankoraŭ ne scias, kio kaŝiĝas en vi.

Vi ankoraŭ ne havas *fidon* al *vi mem*, kaj preferas ricevi planon kaj laborinstruon de *aliuloj*.

Sed tiu fido *doniĝos* al vi, kiam vi vidos, kion vi portas en vi. –

Nur dum via *propra laboro* laŭ la plano kaŝita en vi, via fido iom post iom *kreskos*, kaj tiam vi ekkonos, ke vi ricevis *helpon* ĉar vi fidis *vin mem*, kvankam vi perceptas nur la *helpon* kaj ankoraŭ ne la *helpantojn*. – – –

Nur tiu *spirita* helpo povas esti utila al vi. –

Ĉio, kion oni diras al vi *de ekstere*, povas nur *veki* vin el via dormo por eklabori, – povas fariĝi por vi impulso por *komenci* vian plej bonan faradon. – –

Sed la *helpo*, kiun vi tiam bezonas en via *laboro*, devas veni al vi nur en *spirita* maniero en via *interno*, se ĝi estu vera helpo al vi! – – –

Eĉ se en la ekstera mondo vi estas tre malproksima de ĉia arto, tamen en via *plejinterno* troviĝas artisteco, kiu povas spirite disvolviĝi nur je via *verko*.

Tie ĉi *en via plejinterno* oni scios konduki vin al alta arto: – al la arto formi vian *spiritan vivon* laŭ la imanenta leĝo de la eterna spirito. – – –

De vi oni *atendas* kaj *postulas* nur, ke vi volu lerni *pri-labori*, per via *propra* formanta forto, ĉion krudan, kion via surtera vivo alkondukas al vi tagon post tago, – prilabori por doni al ĝi *formon*. –

Tial mi tiom diversmaniere parolis al vi en tiu ĉi libro pri la neceseco de la *formo*. –

Se vi prave asertas, ke en la ekstera vivo multo povas malhelpi vin formi vian vivon tiel, kiel vi deziras ĝin formita,

mi tamen devas diri al vi, ke vi ankaŭ tie estas multe pli potenca ol vi opinias. – –

Sed vi devos influi tion eksteran de *interne*. –

Penu utiligi ĉion, kion via ekstera vivo alportas al vi, en *spirita* maniero, per tio, ke vi provas spirite *formi* ĝin, kaj iu aŭ alia obstaklo, kiu en la *ekstera* vivo aperis al vi nesuperebla, estos forigata de sur via vojo per via saĝa *spirita* farado! –

Via tuta *ekstera* vivo ŝanĝiĝos laŭ la bildo de via *spirita* vivo, se vi scias spirite *formi* al vi ĉion eksteran. – –

Multajn homojn oni nomis „artistoj de la vivo“ tial, ke ili lerte kaj sekure eligis sin el la danĝeroj, kiuj povas fari la eksteran vivon malĝojiga.

Sed la *arto de la vivo*, pri kiu mi parolas al vi, ne estos perdita al vi *eĉ tiam*, kiam vi devos *forlasi* la eksteran vivon sur tiu ĉi tero.

Ĝi ĝuigos al vi siajn noblajn fruktojn jam en tiu ĉi *surtera* ekzisto, kaj iam prezentos ilin al vi en plej riĉa abundo en tiu *nova maniero de estado*, kiu *sekvas* tiun ĉi teran vivon.

Vere, lerni tiun ĉi arton valoras ĉiujn penojn, kaj ĝi ne rifuzas sin al iu, kiu havas la seriozan *volon*, formi *sin mem* kaj ĉion kion li *spertas*, en *spirita* maniero. – –

Al li ankaŭ ĉiu *surtera* formo malkaŝos sian plej profundan *valoron*. –

En *ĉiu formo* li trovos la *spiriton* aganta. – – –

Fino